



Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2007 numero 2-a: aprilo-junio



Fotis Wolfram Fischer

La 5-an de majo la membroj de Esperanto-Klubo Wil organizis standon en Sankt-Gallen kadre de la Socia kaj Media Forumo de Orienta Svislando (SUFO). Olivia Fischer el Wolfertswil kaj Liliane Sigrist el Flawil prezentas esperanton al la vizitantoj de la foiro.

Raporto pri tiu sukcesa aranĝo legeblas en la rubriko Esperanto-Klubo Wil.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, CP 3034,
CDELI, Bibliothèque de la Ville,
CH-2303 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : claude.gacond@ne.ch

Tel. : ĉe CDELI : 032 967 68 55
hejme: 032 926 52 32

Redaktaj kunlaborantoj :

Rolf Ernst, Nancy Fontannaz,
Stefano Keller, Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2007-3 : julio-septembro :
julie 15.

2007-4: oktobro-decembro:
septembre 15.

2008-1: januaro-marto:
decembre 15.

2008-2: aprilo-junio:
marte 15.

Konsultu la retejon de SES !

www.esperanto.to/ses

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :
032 932 18 88.

Retpoŝto : mireille-grosjean@rpn.ch

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF
301, 8034 Zürich. Tel. : 044 251 50 25.
Retpoŝto : info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,
1002 Lausanne. Tel. : 079 612 75 79.
Retpoŝto: stefano.keller@kontakto.info

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132
Muttens 1. Tel. : 076 460 89 92.
Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2007-2 - verkita de Stefano Keller

1. Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo, okazinta en Ĝenevo, la 28an de aprilo 2007



Ĉiuj fotoj de: Sanjiv Keller

La estraro de SES: Dietrich Weidmann kaj Mireille Grosjean kun-prezidantoj,
Stefano Keller sekretario, Bruno Graf antaŭa prezidanto

Ĉi jare nia Ĝenerala Kunveno estis gastigata de la Esperanto-Grupo „La Stelo“ en Ĝenevo. Kafuma kunestado bonveniga donis eblon al la alvenantoj el diversaj partoj de Svislando por babila retroviĝo post la pasintjara ĉefkunveno de SES. La oficiala parto de la evento okazis antaŭ la tagmanĝo. La kultura-kleriga parto de la jarkunveno proponis al la ĉeestantoj prelegon de Claude Piron pri « Sociorigina afazio », korusan prezentadon de la Grupo de Etoy kaj librobrotadon fare de Andres Bickel.

1. **Salutado, kontrolo de ĉeestantoj kaj senkulpiĝoj**



Arlette Di Vetta bonvenigis la partoprenantojn de la Ĝenerala Kunveno nome de la Esperanto-Grupo La Stelo, la organizanto.

Mireille Grosjean, kunprezidanto de SES gvidis la kunvenon. Ŝi anoncis aldonon de diskutenda temo sub la tagorda punkto 6, pri anstataŭigo de Nicole Margot kiel delegito de SES ĉe Eŭropa Esperanto-Unuiĝo (EEU). La estraro de SES ne ricevis proponojn pri pliaj diskut-temoj. La kunvenon partoprenis 54 personoj el la diversaj partoj de Svislando, inter ili gasto el Hungario. Senkulpiĝis pro ne-ĉeesto: Andy Künzli, Hans-Werner Grossmann, Nelly, Jasmin kaj Linda Weidmann, Alain Favre kaj Anne-Marie Johannot.

2. **Evoluo de la membraro**

Malaperis 31 membroj, plejparte pro malaliĝo. Per minuta silento ni honorigis la 7 membrojn mortintajn de SES. Dek tri novaj personoj aliĝis al SES dum la pasinta jaro.

3. **Akcepto de la protokolo de la ĝenerala kunveno 2006**

La protokolo de la ĝenerala kunveno okazinta en 2006 estis akceptita kun granda danko al ĉiuj aktivuloj pro

ties sindonema laboro dum la koncerna periodo.

4. **Vivo de la societo: akcepto de la estrarraporto**

Rilate al la jarraporto pri la jaro 2006, Mireille Grosjean parolis kun emfazo pri du ĉefaj agadoj:



a) apero de la verko « Svisa Enciklopedio Planlingva », en eldono de SES kaj de CDELI, libro preskaŭ 1'200 paĝa, kiu estas la frukto de la granda kaj kompetenta laboro de Andy Künzli;

b) nia partopreno en speciala ekspozicio pri daŭrigebla evoluo kadre de Comptoir Suisse 2006. Okaze de tiu signifa foiro tutsvisa, centoj da homoj estis informitaj pri Esperanto.


La jarraporto de la estraro pri 2006 estis akceptita unuanime.

5. **Financoj. Prezento kaj akcepto**

Mireille Grosjean substrekis ke la buĝetitajn plielspezojn kaŭzas la subteno al la eldono de la Enciklopedio, kiuj aperos nur en la jarkalkulo 2007a. Claude Gacond eksplikis ke pro ne-alveno de raporto, klarigoj de la aŭtoro, ne eblis akiri sponsorojn. Tiel Claude Gacond mem donacis sumon por la

enciklopediaj kostoj, kies financado devintus esti senkosta dank'al akiruntaj sponsoroj.

Sekve, Claude Gacond laŭtlegis sian



tre atenditan « *Librotenanadan raporton pri la Jubilea Agado 2003 – 2004* », kies kompleta kaj sensanĝa teksto troviĝas post tiu ĉi

protokolo. Mireille Grosjean tre dankis lin pro la granda laboro. André Sandoz laŭtlegis la raporton pri librotenada kontrolo rilate al la financoj traktitaj fare de Claude Gacond (ĉi tiu kontrola teksto aperas ĉi sekve, post la raporto de Claude Gacond). Respondante al la demando de Nicole Margot, Claude Gacond klarigis ke la saldo de CHF 3'852.80 de la Agado 2003 jam estas pagita.



Christiane Sixtus aldonis, ke la kaskontrolantoj de SES ne povis kontroli la librotenanadan raporton laŭtlegitan de Claude Gacond, ĉar la necesaj pruviloj ne estis

je ilia dispono. Sed temas pri librotenada raporto prezentita dum 2007, do ĝi iĝos parto de la jarkalkulo 2007 kaj estos voĉdonita dum la jarkunveno en 2008. Mireille Grosjean ege dankis al Claude Gacond pro liaj jubilea organizado kaj financa raporto.

Ŝi memorigis ankoraŭ pri la fakto ke SES daŭre donacas al KCE la interezojn de la pruntita sumo (CHF 15'000). La jarkalkulo de SES pri 2006, submetita al la ĝenerala kunveno sur la paĝoj de *SES informas* fare de la kasisto Hans-Werner Grossmann, estis unuanime akceptita.

6. Konsisto de la Komitato. Demisio de Bruno Graf. Anstataŭigo de Nicole Margot ĉe EEU.

Bruno Graf demisiis post 9-jara aktiveco kadre de SES. Li parolis kontente pri la nova komitato de la societo. Li konstatis ke la nova formo de prezidado fare de du kunprezidantoj, bone funkcias, en plej agrabla kunlaboremo, harmonie. Mireille Grosjean dankis lin por lia valora kontribuo al la svisa esperanto-movado. La komitato kutimas kunveni en Bielo, urbo facile kaj samdistance



atingebla por la membroj de la aktuala estraro, kaj decidis kunsidi pli ofte dum la jaro.

Nicole Margot estis dum longa tempo la observa delegito de SES ĉe Eŭropa Esperanto Unuiĝo (EEU). Nuntempe ŝi havas multe da laboro kiel redaktisto de *Etnismo*, periodaĵo de IKEL, kaj tiel anstataŭanto devas esti trovita. En la jaro 2007, la kongreso de EEU okazos en la urbo



Maribor, kie Anita Altherr povos ĉeesti por reprezenti SES-n.

Mireille Grosjean estas komitatano de UEA, ŝi kunsidos ĉi jare kun siaj kolegoj dum la UK en Jokohamo.

7. Projektoj por 2007 kaj 2008

Nia societo devas pluvivi! Tial bezonatas projektoj pri aktivecoj kiuj ebligas la daŭrigon de efika pluvivo kaj progreso.

Surkampe de la informado al la ne-esperanta socio en Svislando, daŭre okazas agadoj:

Mireille Grosjean regule dissendas materialon en Romandio al radioj, televidoj, lokaj, regionaj kaj tutsvisaj ĵurnaloj, kaj al aliaj medioj, instancoj. En Alemanio okazas

same, tie Dietrich Weidmann okupiĝas pri la informado el Zuriko.

La estraro do atendas viajn proponojn pri agadprojektoj! Ni bezonas ne nur ideojn sed ankaŭ la personojn, kiuj respondecos pri la aktiveco, organizos kaj realigos ĝin. Devus okazi eventoj malfermitaj ankaŭ al la ne-esperanta publiko.



8. Buĝeto 2007

La buĝeto por la jaro 2007 estis akceptita kun unu sindeteno.

9. Diversaĵoj

a) En la privata lernejo en La Chaux-de-Fonds, La Granda Ursino, kiu havas elementan kaj mezgradan klasojn, Esperanto estas regule instruata al la lernantoj. Por la daŭrigo de sia ekzisto, la lernejo bezonas financan apogon. Vetkuro estas organizita, kies partoprenanto estas ankaŭ Monika Molnár, la esperanto-instruistino de la lernejo. Oni povas subteni la lernejon per donaco de sumeto por ĉiu rondo kiun Monika finkuros en tiu maratono. www.grande-ourse.ch

b) Wolfram Fischer-Schmitter anoncis la ĉeeston de esperantistoj en forumo pri socio kaj medio-

protektado okazanta en Sankt-Galo. Li prelegos kun sia filino, Olivia



Fischer en laborgrupo pri „*Esperanto - eine gerechtere Sprache für eine andere Welt?*“. Belan kaj kompetente redaktitan fald-folion aperigis

Esperanto-Klubo Wil por la okazo. <http://sufo.ch/forum/workshops.asp>

c) Jean-Thierry von Büren informis pri la instrua kaj kulturaj aktivecoj okazantaj en CDELI: seminarioj, la unuan sabaton kaj studrondoj, la trian sabaton de la monatoj, dum la tuta jaro. Jen ebloj por progresi kaj kleriĝi en Esperanto.



d) Nicole Béroud bedaŭris ke oni ne povas trovi aktualajn informojn pri eventoj sur la retpaĝoj de SES.

e) Prezento de la nova asocio Esperanto-Genève-Régions (EGR) fare de Marie Zoller. EGR celas plifaciligi kontaktojn, kunordigi aktivecojn inter lokaj grupoj en Francio kaj en Svislando, en la regiono de Ĝenevo. EGR havos budon ĉe la ĉi jara Librofoiro de Ĝenevo.

www.esperanto-geneve-regions.info


Per tiuj intervenoj konkludiĝis la Ĝenerala Kunveno 2007 de Svisa Esperanto-Societo.



- *Protokolis: Stefano Keller* -

* * *


Sekvas kelkaj fotoj de la tago. Tiuj (kaj pliaj) estos videblaj ankaŭ sur la reto. Pri la koncerna retpaĝo bv. informiĝi ĉe la sekretario de SES.



Elisabeth de Mestral, gvidantino de la ĥoro « Grupo de Etoy »



*Gekantistoj el la ĥoro
«Grupo de Etoy»*



*Claude Piron prelegis pri
« Sociorigina afazio »*



Anita Altherr kun Stefano Keller



Atentema publiko de prelego



*Andres Bickel zorgis pri
librobrokantado*



Vizitantinoj el Alemanio (dekstre)




Pri vinberisto: la «Grupo de Etoy»



Babilado kun gasto el Hungario



Kantante...



Ĝenevo...



Dum kafuma kunestado



54 personoj kunvenis



Protokolante...

Librotenada raporto pri la Jubilea Agado 2003-2004

Claude Gacond

Laŭtlecita dum la Ĝenerala Kunveno de SES 2007

En la ĉijara raporto de la kaskontrolantoj ni prave legas, ke « *nur en Esperantio oni toleras tian prokraston* », kiun mi kaŭzis. Sed samtempe tiu rimarko pravas, ke la koncernaj kaskontrolantoj ne konis la cirkonstancon, kiu kondukis al mia malakurateco. Tial komence al mia raporto, mi rememorigas fakton silentitan, sed tamen konindan.

Kiam en 2001 kaj 2002 mi planadis la jubileajn amas-renkontojn de Rolle, Vevey kaj Les Brenets antaŭviditajn por la sekvaj jaroj 2003 kaj 2004, tiam estis klare antaŭvidite, ke la librotenado de tiuj aranĝoj neniel dependos de mi, sed de SES mem. Sed ekde la komenco de la jaro 2003, kiam mi estis plananta la unuan renkonton, montriĝis, ke kolapsis la librotenado de SES, kaj ke malgraŭ mia atentigo pri tiu nekontentiga situacio, laborpaneo de la kasistino Elisabeth Lauper, ne proponiĝis almenaŭ provizora helpo.

Tial, kiam mi ekredaktis la invitilon al la unua aranĝo de la 27-a de septembro 2003 okazonta en Ouchy kaj Rolle, mi devis mem elturniĝi per malfermo de dua persona profesia poŝta konto, aldone al mia konto Esperanto perkoresponde 23-6818-6. Tiel kreiĝis en urĝo mia konto 17-334343-4, kies pagiloj akompanis la invitilon al la manifestacio de la 27-a de septembro, anstataŭ la antaŭvidita poŝtpagilo de SES. Kaj montriĝas, ke

en julio de la sekva jaro 2004 la nova kasisto Hans-Werner Grossmann de SES povis fine direkti al tiu ĉi konto aron da pagoj venontaj al la konto de SES por la renkonto de la 27-a de septembro en Ouchy-Rolle. Pro tiuj cirkonstancoj, kaj kontraŭ mia volo, mi devis aldoni al mia jam streĉa organiza laboro regulan noktan laboron por akurata registro de la alvenantaj pagoj de la partoprenontoj al la aranĝoj, kaj tio ĉi por la tri amas-renkontoj. Nur en Esperantio io tia povas okazi !

Sed en oktobro 2004, kiam mi estis konkludanta tiun ĉi librotenadon, tiam mia persona komputilo paneis kaj mi perdis ĉiujn retaĵojn inkluzive de la retadresaro kaj koncerne al la librotenado ĉiujn registraĵojn de la jaro 2004. Ĝojige restis al mi printita kopio koncerne al la librotenado de la jaro 2003 kaj la surpaperigita situacio de la komenco de la jaro 2004. Sed tio signifis por mi rekomencon de la registrado de la tuta jaro 2004. La absolute necesan trankvilan semajnon por tiu librotenada referado mi fine retrovis nur dum la paska semajno 2007-a, ĉar ekde aŭtuno 2004 pro la bonvena sed ne antaŭvidita transformado de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, komenciĝis trifoja translokiĝo de la materialo de CDELI, do por mi kaj por miaj kunlaborantoj enorma laborego. En aprilo 2006 CDELI povis instaliĝi en sia nova laborsalono, kiun vi povis digne

inaŭguri la 6-an de majo okaze de nova festa amas-kunveno. Sekvis la dissendo de la Enciklopedio pri la *Universalaj lingvo en Svislando* de Andreas Künzli dum la unua trimonato de 2007. Mi povis fine reinstali novan version de Banana por reregistri la librotendon de la jaro 2004 kaj konkludi la kalkulojn de la jubileaj renkontoj nur poste. La antaŭa provo en CDELI mem per la uzo de la antaŭa Banana programo montriĝis nebla, ĉar la programo estis agnoskita kiel jam antaŭe uzata, kio estis prava, kaj tial mi ankaŭ evitis reuzi ĝin sur mia nova hejma komputilo.

Esperantie povas okazi io tia pro manko de la necesaj kunordigaj fortoj. Jam miraklas, ke malgraŭ la librotenda kolapso de SES, mi povis tamen kontentige plenumi mian organizan funkcion de gravaj aranĝoj, kiuj grupigis en Ouchy kaj Rolle iom pli ol 120 partoprenantojn, en Vevey 60 aŭskultantojn al prelegado de Andreas Künzli kaj ekspozicion vizitatan de pli ol cento da interesatoj, kaj en Les Brenets denove pli ol 120 partoprenantojn. Kio gravis, tio estis drasta atento por eviti neantaŭviditajn elspezojn, kaj do eblan deficiton. La fr 3000.- buĝetitaj por tiuj tri aranĝoj ŝajnis al mi kontentigaj. Aranĝon post aranĝo mi kontentiĝis pagi al la partoprenantoj nur tion, kio reale rilatis al la restoraciaj kaj veturkostoj, por eviti, ke tro alta partoprenokosto malkuraĝigu partoprenon.

Ĉiuj kunlaborantoj helplaboris absolute sen mona rekompenco. Kaj ilin mi dankas: mia edzino Andrée Gacond kun Nancy Fontannaz semajnon post semajno helplaboris por la pretigo de la anonciloj kaj de la partoprenŝildoj, por la vizito de la

kunvenejoj kaj por la surloka helporganizo. Kaj ĉiuloke ni ricevis taŭgan helpon: membroj de la laŭzana societo gvidis la alvenantojn al la kastelo de Ouchy kaj surŝipe korusis, François Randin zorgis pri la alpkorna akcepto, Marion Bélisle modele violonĉele akceptis nin, en Rolle Marguerite Jaccard helpis por la lokaj kontaktoj, Jean-Thierry von Büren, Joëlle Grosjean, Luc Allemand kaj Claude Piron modele kulture rolis, en Vevey ĉirkaŭ Charlotte Blanc Maillard deĵoris aro da sindonemuloj kadre de la ekspozicio en Magasin du Monde kaj modele prelegis Andreas Künzli, kaj en Les Brenets helpegis Mireille Grosjean kaj Luc Allemand organize kaj traduke, Gilbert Déhon kaj Philippe Petit-Jean, la prezidanto kaj sekretario de la Komunumo, Pierre Deléglise la historiisto per ekspozicio pri Edouard Ducommun, la gelernantoj de La Grande Ourse kaj ties instruistinoj Monika Molnar kaj Anke Brouwer. Ni povas fieri pri tiuj kunlaboroj.

Sen transportebla laŭtparolilo tiaj amas-aranĝoj ne estas organizeblaj. La strebado cele al luo de tia aparato montris, ke por ĉiu aranĝo la kosto estus kondukinta al elspezo de po fr 600.-, do entute por tri aranĝoj de fr 1800, tial mi decidis akiri unu el tiuj aparatoj kun rulkofro, tio per mia konto 23-6818-6 de Esperanto perkoresponde per sumo de fr 1000.-, kaj per persona elspezo ankaŭ de sumo de fr 1000.- Tio trionigis la luprezon je po fr 200.- por aranĝo, luo, kiun mi dediĉis al la finpago de la aparato. Nun tiu aparato kaŝiĝas en la CDELI-salono atendante pluan uzon por okazigo de amas-aranĝoj.

Amas-aranĝoj okazigas grandajn elspezojn. Inter ili mi menciuj la ĉefajn.

La aperitivo en la Kastelo de Ouchy kostis fr 816.-, kaj sur la ŝipo 814, la veturkostoj ŝipa fr 859.40 kaj trajna 262.-, la manĝo en Rolle fr 2750. Al la alpkornisto ni ŝuldis fr 300.- La ekspoziciejo en Vevey kostis 150.- por la luo de la ekspozicio kaj pli ol fr 500.- por la materialo. En Les Brenets la memorŝildo kostis fr 807, la ekspozicio pri Edouard Ducommun fr 300.-, la luo de la salono fr 180.-. La nuna posedanto de la tiama domo de Edouard Ducommun donacis fr 200.- kaj saman sumon la Komunumo de Les Brenets. La tagmanĝo elspezigis fr 1476.39 kaj la trinkaĵoj en la ekspoziciejo tricenton da frankoj.

El la ricevitaj Fr 3000.- mi antaŭvidis elspezon de po fr 1000 por aranĝo, kaj sekve al ĉiu aranĝo fiksas la kotizon de la sekva renkonto por ekvilibri la kostojn. Tiel finkalkule ni alvenas al la kontentiga situacio de suma profiteto de fr 88.45, kiu fakte kompensas la poŝtĉekajn taksojn.

Pro la paneo de mia hejma komputilo, kiam mi fine remetiĝis al la librotenada laboro en pasko 2007, mi relistigis ĉiujn elspezojn de la jaro 2003 por faciligi la laboron de la kontrolistoj kaj povis montri la ĵus refaritan librotenadon de la jaro 2004. La mardan posttagmezon 24-an de aprilo la ĉaudefonanoj André Sandoz kaj Ginette Pellaton akceptis veni kontroli tiun librotenadon. Ili atente kontrolis ĉiujn pecojn en rilato kun la konto 17-

334343-4 kaj mi havis la agrablan senton, ke ili konstatis, ke mia librotenado de la jubileaj aranĝoj estis bone komprenebla, kvankam miksitaj al la diversaj aliaj rubrikaj de la librotenado de Esperanto perkoresponde, kiuj ankaŭ koncernas la aktivecojn proprajn al aliaj laborkampoj: libroservo, brokanata servo, helpoj al CDELI, perkoresponda kurso, ktp, kiuj ne koncernas la jubileajn aranĝojn.

Amas-renkontoj kun rilatoj kun la ĝenerala publiko, kiel estis la festkunvenoj de Ouchy-Rolle, Vevey-Magasin du Monde kaj Les Brenets, certe portas pozitivajn fruktojn per siaj gazetaj kaj radiaj eĥoj, sed ĉefe per la monstro mem de la ekzisto de esperanto al ĝenerala publiko. Tial espereble novaj tiaj aranĝoj konigos esperanton ekster niaj iom tro fermitaj medioj, kiel okazis la 6-an de majo inaŭgure al la nova salono de CDELI kun publiko de pli ol 150 personoj.

Mia nura espero estas, ke la organizontoj de tiaj aranĝoj ne renkontos la librotenadan problemon, kiun mi devis alfronti. Nia societo nepre havu deĵorulon, kiu estu preta anastataŭi la kasiston okaze de malsaniĝo. Tio ne estis antaŭvidite por la jaro 2003 kaj sentiĝis ĝis nun per prokrasto de la librotenada raporto.

Claude Gacond, la 26-an de aprilo 2007

* * *

Raporto pri librotenada kontrolo

La subskribintoj Ginette Pellaton kaj André Sandoz kunvenis ĉe Claude Gacond la 24-an de aprilo 2007 por kontroli detalege ĉiujn pecojn koncerne al la ĉekokonto 17-334343-4 de Esperanto perkoresponde renkontoj. Claude Gacond kapablis respondi al ĉiuj niaj demandoj. Ni tiam ekkonsciis pri la enorma laboro, kiun li plenumis por organizi kaj sen deficino sukcesigi la tri jubileajn renkontojn de Rolle, Vevey kaj Les Brenets.

Ni povas aserti, ke ĉiu spez-rubriko kongruis kun la koncernaj atestiloj kaj ke eblas kvitanci Claude Gacond kun dankemo.

La Chaux-de-Fonds, la 24-an de aprilo 2007

(Subskriboj de André Sandoz kaj Ginette Pellaton)

* * *

2. Donacoj ricevitaj en januaro, marto, aprilo, majo 2007

Sumo ricevita en januaro 2007: 65.- svisaj frankoj. Donacintoj:

S-ro François Huguenin, La Chaux-de-Fonds (15); S-ro Hans Meier, Basel (25); S-ro Dietmar Vogel, Freiburg/Germanio (25).

La listo de februaraj donacintoj aperis en SES-i 2007-1

Sumo ricevita en marto 2007: 125.- svisaj frankoj. Donacintoj:

Ges-roj Tazio kaj Teresita Carlevaro, Bellinzona (20); S-ro Didier Cornuet, Genève (15); S-ino Gertrud Eisenegger, Zürich (15); S-ro François Gacond, Neuchâtel (25); S-ro Ernst Glättli, Brugg (15); S-ino Mireille Grosjean, Les Brenets (20); S-ro Carlo Nicolodi, Allschwil (15).

Sumo ricevita en aprilo 2007: 335.- svisaj frankoj. Donacintoj:

S-ro Claude Blanc, Genève (50); S-ino Lucienne Dovat, Renens (100); S-ino Jeanne Mamin, La Tour-de-Peilz (30); Ges-roj François kaj Chantal Perret-Gacond, Genève (5); S-ro Willi Rieser, Zürich (10); S-ro André Sandoz, La Chaux-de-Fonds (100); S-ro Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds (20); S-ino Noëlle Vitry, Cugy (20)

Sumo ricevita en majo 2007: 130.- svisaj frankoj. Donacintoj:

S-ro Traugott Rinaldo Aebi, Ittigen (5); S-ro Alois Koller, Zürich (30); S-ro Hans Meier, Basel (10); S-ino Marguerite Viredaz, Lausanne (5); S-ro Erich Werner, Hochdorf (50); S-ro David Buhlmann, Prilly (30).

Nome de SES, Hans-Werner Grossmann, la kasisto dankas la donacintojn pro ties malavara subteno al nia societo. Li ankaŭ dankas al ĉiuj kiuj jam pagis la kotizon por la jaro 2007.

* * *

3. Novaj patronoj, 2007

Ges-roj Gabriel kaj Verena Chaves-Walder, Flawil; S-ino Andrée Gacond, La Chaux-de-Fonds; S-ino Marguerite Jayet, Morges; S-ro Luciano Ortelli, Luzern; S-ro Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz; S-ro Traugott Rinaldo Aebi, Ittigen; S-ino Sonja Béatrix-Koleva, Travers; S-ino Odette Fregonara, Genève; S-ino Nancy Fontannaz, Pully; S-ro Alois Koller, Zürich; S-ino Anita Altherr, Bernex.

* * *

4. Reta versio de SES informas

La estraro de SES ŝatus plibonigi la informadon kaj al siaj membroj kaj al la ekstera publiko. Tial la temoj *retejo* kaj *informilo* ofte aperas dum niaj kunsidoj. Mi persone klopodos dediĉi tempon kaj laboron al la aktualigo de la retpaĝoj de SES (mi ja okupiĝas pri retejoj ĉiutage) kaj al disponigo de nia informilo al la legantaro rete. Kiuj volus estonte ricevi la retan version (pdf) de SES informas, tiuj bonvolu sendi sian nomon kaj retadreson al ses@esperanto.ch aŭ rekte al mi stefano.keller@kontakto.info

Mi deziras al vi agrablan legadon,

Stefano Keller, sekretario
Svisa Esperanto-Societo



Tutsvisa aktiveco

Invito al grava konferenco-tago

okazonta en La Chaux-de-Fonds

ĉe CDELI en la urba biblioteko

la sabaton 1-an de septembro

sub la aŭspicio de ILEI, SES kaj UEA

Prelegos Reinhard Haupenthal

eldonisto, historiisto, esperantologo kaj esploranto pri
Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapük.

Programo kaj horaro :

10.00 : **Malfermo de la CDELI-salono**, eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

10.45 : **Oficiala malfermo** de la konferenco-tago en la salono Charles Humbert.

11.00 : Unua prelega periodo dediĉita al la biografio de Johann Martin Schleyer : stacioj de lia vivo, liaj roloj kaj funkcioj.

11.45 : paŭzo kafuma.

12.00 : Dua prelega periodo dediĉita al la starto de Volapük en komparo kun la starto de Esperanto : elmontro de paraleloj.

12.45 : Kuniro al najbara picejo por **komuna tagmanĝo** (pago surloka).

14.15 : Tria prelega periodo dediĉita al la historio de Volapük : ĝiaj disvastiĝo, literaturo kaj gazetaro. Ĉefaj figuroj de la Volapük-movado.

15.00 : paŭzo.

15.15 : Kvara prelega periodo dediĉita al la lingva strukturo de Volapük.

16.00 : **Konkludo** en la CDELI-salono : eblo aĉeti librojn, babili kaj teumi.

17.00 : **Oficiala fermo**.

Aliĝo : Por faciligi la organizon de la konferenco-tago ĉiu partoprenonto sin anoncu ĉu skribe al Claude Gacond, CDELI, Bibliothèque de la Ville, CP 3034, CH-2303 La Chaux-de-Fonds, ĉu rete : claude.gacond@ne.ch, ĉu telefone : CDELI : 032 967 68 42.

Partopren-kotizo pagota surloke : po frankoj 20.- por partopreno anoncita ĝis la 25-a de aŭgusto, po frankoj 25.- por partopreno anoncita post la 25-a de aŭgusto, po frankoj 30.- por partopreno ne antaŭ-anoncita. Duonpreze por studento. **Do tuj anoncu vian aliĝon al tiu neordinara renkonto!**

-oOo-

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33
CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 42.

Retadresoj :

claude.gacond@ne.ch
martine.schneller@ne.ch
monika.molnar@ne.ch
nancy.fontannaz@ne.ch

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Rezervu la sekvajn sabatojn : **septembre 22, oktobre 20, novembre 17, 2008 januare 19, februare 16, marte 15.**

Kultura seminario okazas principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo. Rezervu la sekvajn sabatojn : **septembre 1, oktobre 6, novembre 3, decembre 1, 2008 februare 2.** La celo de tiu seminario, kiu disvolviĝas sub la aŭspicio de SES, ILEI kaj UEA, ne estas la studo mem de la lingvo, sed kleriĝo koncerne al la historio kaj al la literaturo de esperanto. Partoprenintoj al 15 tiaj sabatoj estos re-kompencitaj per ricevo de atestilo.

Horaro de ambaŭ aranĝoj

10.00 : Malfermo, eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

10.45 : Oficiala malfermo, formiĝo de la stud-rondoj. 11.00 : Studo. 11.45 : paŭzo. 12.00 : Studo. 12.45 : foriro al tagmanĝo.

14.15 : Studo. 15.00 : paŭzo. 15.15 : Studo. **16.00 : Konkludo** kaj teumo, librovendo. **17.00 : Oficiala fermo.**

Aliĝo : Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj **ĉiu bonvolu nepre antaŭanonci sian partoprenon almenaŭ ĝis la ĵaŭdo antaŭ la koncerna aranĝo** al Nancy Fontannaz : telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo) aŭ rete : nancyfontannaz@freesurf.ch.

Partopren-kotizo : Por minimuma kovro de la elspezoj la partopren-kotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato (senpage por studentoj) kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario (duonpreze por studentoj).

SIS

Svisa ILEI Sekcio

Prezidanto: Mireille Grosjean, Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets.

JARRAPORTO 2006

SIS nombras preskaŭ 20 membrojn. La prezidantino estas Mirejo Groĝan (Mireille Grosjean), la kasisto kaj sekretario estas Francisko Randin.

Unu membro de SIS estas la lokomotivo de la agado. Temas pri sinjoro Claude Gacond. Li estas la arkivisto de la arkivejo CDELI : Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia. Tiu arkivejo situas en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds, norde de la francparola parto de Svislando.

Unufoje monate estas kursoj ĉe CDELI : la trian sabaton de la monato. Kutime estas tri niveloj : tutkomencantoj, mezuloj kaj lertuloj. Homoj venas el tuta Svislando, foje eĉ el eksterlando (Francio ekzemple). La instruantoj estas Monika Molnar, Nancy Fontannaz, Luko Allemand, Stefano Keller kaj Claude Gacond mem. La kunveno daŭras de la deka ĝis la dekseka kun komuna tagmanĝo. Ĉiam regas bonega etoso sen iu krokodilado. Ofte venas tutkomencantoj. La nombro de partoprenantoj kutimas esti ĉirkaŭ 15, foje ĝis 30.

Unufoje monate okazas en CDELI seminario : la unuan sabaton de la monato. La grupo estas pli malgranda ol la grupo de la kursoj : inter 6 kaj 10 partoprenantoj. Sinjoro Gacond elektas temon kaj prelegas. Ĉar liaj scioj estas grandaj, la intereso pri tiuj seminarioj estas granda. Homoj venas el tuta Svislando. La horaro estas la sama kiel por la kursoj.

La aktivecoj ĉe CDELI okazas sub la aŭspicioj de Svisa ILEI sekcio (SIS) kaj de Svisa Esperanto Societo (SES).


Okazas en kelkaj urboj de Svislando (Ĝenevo, Laŭzano, Zuriko, Lucerno, Wil

ktp) kursoj, studrondoj, paroligaj vesperoj gvidataj de SISmembroj aŭ de neSIS-membroj. Ekzemple la ĝenevanoj havas la ŝancon lertiĝi sub la gvidado de alia fama Claude : sinjoro Claude Piron.

En la granda enciklopedio « *Universalaj Lingvoj en Svislando* » verkita de sinjoro Andreas Künzli kaj aperinta en la jaro 2006 oni povas legi pri SIS je paĝo 408.

La prezidanto : Mirejo Groĵan (Mireille Grosjean)

Les Brenets. 2007.05.28



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20.00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Venontaj kunvenoj

Junie 28 : Grün.

Julie 12 : Krad-rostado ĉe H.-P. Senn.

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20.

Espéranto-infos : Tel. : 022 740 04 45.

Monata kunveno la unuan mardon de la monato (krom julie kaj aŭguste) 20.00 en la stacidomo de Cornavin, kajo 1, salono 2.

Venontaj kunvenoj

Junie 23-25 : Semajnfino enĉaleda kun la vaŭdaj samideanoj. Vidu la anoncon en la laŭzana rubriko.

Aŭguste 18 : Promenado tra la malnova urbo. Rendevuo : Tour de l'Ile je la 14.30.

Naskiĝo de nova asocio

Sub la nomo *Espéranto-Genève-Régions* ĵus kreiĝis asocio kun sidejo en Francio en Saint-Genis-Pouilly proksima al Meyrin en Svislando. Ĝi celas esti translima asocio faciliganta rilatojn inter esperantistoj de Pays de Gex, Ĝenevo kaj la lemana ĉirkaŭaĵo. Aliĝa kotizo estas je € 3 aŭ Fr 5. Tiun asocion fakte naskis la *Lunda Grupo* sekve al poresperanta aktiveco en la ĝeneva Libro-Foiro kaj al

kunlaboremo de esperantistoj el ambaŭ flankoj de la franc-svisa landlimo.

La *Lunda Grupo* estas babil-rondo grupiganta esperantistojn komencantajn kaj progresantajn, kiuj deziras parole praktiki esperanton. Ĝiaj renkontoj okazas en Ĝenevo la lundon ekde la 18.00 en la bierejo Cheminots, 7 rue des Gares, malantaŭ la stacidomo Cornavin. La provizora komitato de la asocio konsistas el Marie Zoller, prezidanto, Charmian Common, vicprezidanto, Jacqueline Favre, sekretario kaj Ghyslaine Gantert, kasisto. La retejo de la asocio estas : www.esperanto-geneve-regions.info, kaj la retadreso charmian@tiscali.fr. Por telefonaj rilatoj : +33 (0)450 422 802.

Stando en la Libro-Foiro

De la 2-a ĝis la 6-a de majo membroj de la asocio *Espéranto-Genève-Régions* organizis standon pri esperanto en la ĝeneva Libro-Foiro. Tiurilate jen raporto pri tiu aventuro :

« Aŭdiĝas granda bruo, laŭta zumzumado kiel esameno da abeloj. La Foiro ankoraŭ ne ekkomenciĝas, kaj ĉiuj ekspoziciantoj kuras ĉien kaj reen iom post iom al kutimiĝante al la nova abelujo, en kiu ili enloĝiĝas, ĉiu en sia ĉelo.

La ekspoziciantoj havas du tagojn por ĉion kunporti kaj por organizi sian budon. Ili foje trairas la halon de Palexpo per strangaj veturiloj, ĉar la ejo vastas - ĉu surfo-tabule, skutile, rulŝue, ĉu per du- aŭ tri-rada biciklo, starbiciklo kun du grandaj radoj, inter kiuj la gvidanto staras

apogante sin sur gvidilo, ĉu eĉ aŭte kaj kamione !

Tamen, post tiu granda tohuvabohuo, je la malferma mateno, mirakle ĉio pretas, la zumzumado kvietiĝas kaj iĝas ronrona. Inter amaso da libroj ĉe la Alternativa Vilaĝo staras multaj buntaj budoj kun belegaj silkaĵoj, brodaĵoj, juveloj, T-ĉemizoj, ktp, endomigante asociojn por tibetanoj, palestininoj, irakaj rifuĝintoj, inter aliaj. Apud budeto, kiu subtenas indiĝenajn popolojn en Sud-Ameriko, troviĝas granda ŝildo : ESPERANTO - estas ni, kun niaj belaj multkoloraj afiŝoj.


Tuj post la malferma horo ni akceptas la unuajn vizitantojn, kaj senprokraste ekviglas diskutojn pri esperanto kaj pri lingvoj. Ne nur plenkreskuloj vizitas nin, sed ankaŭ junuloj, adoleskantoj kaj infanoj.



La esperanto-stando

Kelkaj junuloj vere miras, kiam ili malkovras esperanton, ili tute ne scias pri ĝi - multaj demandoj temas pri interreto kaj nia listo de TTT-ejoj rapide elĉerpiĝas. Kelkaj homoj diras "Ho, esperanto ! Mi tute ne atendis vidi budon pri tio !" Aliaj diras "Bonege, mi tuj eklernos !" Iu estas tre emociigita, ĉar lia patro

instruis esperanton altnivele en Ĝenevo antaŭ 40 jaroj kaj li tute hazarde trovis nian budon. Tiu patro malpermesis al la infanoj lerni la anglan! Maljuna sinjorino trovis inter la paperoj de sia patro poemon, kiun li mem verkis en esperanto. Ŝi deziras sendi tiun poemon al Esperanto Lyon, kie li loĝis tiuepoke, ŝi do estas tre ĝoja trovi la deziratan adreson ĉe nia budo. Kelkaj homoj diras "Eble estas vi, kiuj tenas la solvon".



Dum debato

La temo de la Alternativa Vilaĝo estas: "Nova komerco fronte al klimataj ŝanĝoj" kaj la jaŭdon ni partoprenas debaton pri la situacio de esperanto laŭ plimalpli komerca vidpunkto. Ni citas la raporton de Profesoro François Grin, kiu faris analizon por la Franca Registaro pri la lingvoproblemo en Eŭropa Unio. Li konstatis, ke se oni adoptus esperanton kiel pontlingvon, tiam oni ŝparus 25 miliardojn da eŭroj jare. Alia temo estas enkonduko de esperanto en Unuiĝintaj Nacioj, kiu verŝajne ne okazos, ĉar male ol la Eŭropa Unio, ili jam elektis 6 oficialajn lingvojn kaj du aŭ tri labor-lingvojn, do ili opinias, ke tio sufiĉas. Ni ankaŭ parolas pri uzo de

esperanto en pli komercaj kampoj, ekzemple pri traduko de informiloj por turistoj, aŭ pri uzindikiloj por aparatoj. La demandoj estas tre trafaj kaj oni multe kuraĝigas nin fari pli por konigi esperanton - ekzemple kunlabore kun la Urbestro de Ĝenevo!

Niaj vizitantoj alfluas konstante ĝis la dimanĉo - nia budo havas grandan sukceson, ni disdonas multajn informilojn kaj la reagoj de la vizitantoj estas precipe tre pozitivaj. La vespero alvenas kaj ni denove ekaŭdas pligrandiĝantan zumzumadon - jes, la abelaro ree esamenas. Post unu horo la budoj estos malplenaj kaj la abeloj forflugintaj.

Charmian Common

Piknik-propono

Asocio Esperanto-Genève-Régions proponas piknikon je la sabato 7-a de julio en Bois de la Batie, Ĝenevo. Por atingi la parkon trafu Buson 10-an, direkto Onex, ĝis Claire Vue aŭ Cimetière (ne la haltejo Batie mem, krom se vi ŝatas grimpi!). La renkonta loko troviĝas apud la infan-ludejo, kaj la horo estas la 12.00.

Bonan apetiton al la piknikontoj!

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 021 657 14 56

esperanto@isuisse.com

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20.00.

Venontaj kunvenoj

Junie 22-24 : Somera ekskurso – Semajnfino enĉaleda ekde la vendredo 22-a ĝis la dimanĉo 24-a de junio.

Kie : La ĉaledo konstruita de nedrinkemaj fervojistoj nomata *Nia rifuĝejo – Notre Abri* posedas 30 litojn en ĉambroj kaj dormejoj. Ĝi superas la lemanan lagon en la montoj super Montreux-Blonay vidalvide al la Sonloup hotelo. Ĝi atingebblas aŭte kaj trajne ĝis Chamby.

Kio : Laŭzana Esperanto-Societo invitas vin partopreni tiun semajnfino. Diversaj aktivecoj estos proponitaj, inter kiuj kuirado, esperanto-kurso, ludoj kaj promenadoj.

Kiam : Ekde la 18.00 la vendredon 22-an ĝis la dimanĉo 24-a post la ĉaleda reordigo.

Kiel : La vendreda vespermanĝo, la sabataj maten- kaj tag-manĝoj kaj dimanĉa matenmanĝo estos organizataj individue. Sabate vespere ni kune festenos dank'al la kuirema grupo.

Prezo : Por la tuta semajnfino kun du tranoktoj kaj du manĝoj : sabata vespermanĝo kaj dimanĉa tagmanĝo, po fr 65.- por persono en 2- aŭ 4-lita ĉambro aŭ po fr 45.- en dormejo (10-lita ĉambro). Senpage por la junuloj ĝis 16-jaraĝaj. Kunprenu viajn litaĵojn aŭ dormosakon.

Aranĝoj : Se vi ne povos partopreni la tutan semajnfino, tiam kontaktu François Randin telefone : 076 411 14 55 ekde la 5-a de junio.

Kiuj : La unuaj pagintoj estos unue registritaj. La disponebloj estas limigitaj, do rapide sendu perpagile 10-26785-8 la sumon por via(j) tranoktado(j) indikante ĉambre aŭ dormeje. Ankaŭ eblas aliĝi retroŝte tra esperanto@citycable.ch. Se vi nuligos vian aliĝon, tiam nur la duono de la mono repaĝigos al vi.

Limdato : La aliĝa limdato estas la lundo 18-a de junio. Poste ne plu eblos aliĝi al la sabata vespermanĝo.

La organiza LES-komitato.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel. : 041 280 46 12.

Kunvenejoj :

Restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke.

Restoracio Bellini (hotelo Continental-Park), Murbacherstr. 4. Tel. : 041 228 90 50
Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel. : 041 210 25 88.

Venontaj kunvenoj

Julie 11 : ĉe Bellini : 14.00-16.00 : Konversacia rondo, kun Sonja Brun.

Aŭguste 10 (vendrede vespere) :

Ekskursiva vespero

Lucerna Esperanto-Societo invitas partopreni la someran ekskurson kun kuna vespermanĝo.

Horaro : 17.10 : Renkontiĝo sub la "historia pordego" sur la lucerna stacidoma placo.

17.15 : Starto al agrabla promonado laŭlonge de la lucerna lago al 'Hermitage'.

19.15 : Komuna vespermanĝo (je propraj kostoj).

Eblas ankaŭ tien kaj reen iri per aŭtobuso.

En kazo de maltaŭga vetero ni renkontiĝos je la sama loko kaj horo.

Anstataŭ la promeno ni veturos per aŭtobuso al la transport-muzeo, kie en la IMAX-kinejo ni spektos la filmon *Ursoj* kaj poste antaŭen-busos al 'Hermitage'.

Bonvolu anonci vian partoprenon ĝis la ĵaŭdo 9-a de aŭgusto telefone : 041 210 25 88 aŭ rete :

konradrey713@bluewin.ch, kie ankaŭ pluaj informoj haveblos.

Septembre 12 : ĉe Bellini : 14.00-16.00 : Konversacia rondo, kun Paul Scherer.

Oktobre 10 : ĉe Rey : 14.00 : Paroliga leciono, kun Paul Scherer. 14.30 : Pensiulino parolas pri aktiva 3-a aĝo, kun Margrit Scherer.

Novembre 14 : ĉe Bellini : 14.00-16.00 : Konversacia rondo, kun Sonja Brun.

Decembre 12 : ĉe Rey : 14.00 : Paroliga leciono. 14.30 : Zamenhofologio kaj programo 2008, kun Paul Scherer.

2008 Januare 09 : ĉe Bellini : 14h00-16h00 : Konversacia rondo, kun Sonja Brun.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch kaj Wolfram Fischer. Steigstrasse 12, 9116

Wolfertswil. Tel. : (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax : 071.390.04.47.

Kunvenoj : la unuan merkredon de la monato je la 19.00 en la Restoracio Blumeneck, Sântisstrasse 1 (apud la suda elirejo de la fervoja stacidomo).

Venontaj kunvenoj

Julie 4 : Ekskurso al la turo de Wil sur Hofberg, vizitado de la ŝtupo malavare pagita de Esperanto-Klubo Wil.

Aŭguste 12 : Tuttaga ekskurso.

Septembre 5 : Lingvo-ekzercado kaj programo decidota.

Oktobre : sen aranĝo.


Novembre 7 : Vojaĝraporto el Hispanio.

Decembre 5 : Fondua vespero kun poemoj, rakontoj, kantoj.

-oOo-

Eblas alia lingva mondo

Pri esperanto ĉe SUFO 2007 laŭ raportado de Richard Schneller kaj Olivia Fischer



Fotis Wolfram Fischer

Olivia Fischer dum la debato

La 5-an de majo okazis duhora debato en Sankt-Gallen dum la Socia kaj Media Forumo de Orienta Svislando (SUFO). Ĝia temo estis : *Esperanto, ĉu pli justa lingvo por*

alia mondo? SUFO estas fakte aranĝo, kie bonvenas prezento de mond-plibonigeblaj ideoj.

Pluva vetero bedaŭrinde malfavoris la vizitadon de nia stando. Tamen kontentiga estis partopreno al nia debato. Venis ok interesatoj pri esperanto kaj kvin geesperantistoj, inter kiuj du gastoj el Slovakio kaj Ĉeĥio.

Sub entuziasma gvidado de Wolfram Fischer kaj de ties filino Olivia, liceanino lerninta la lingvon internacian en mallonga tempo, la partoprenantoj aliris laŭ originala kaj didaktika maniero la problemon de lingva komunikado internacia. Ludaj situacioj komprenigis, kiom malfacila kaj nepersoniga ofte estas la uzo de la angla por internacia komunikado. En la dua parto de la debato la partoprenantoj ricevis la taskon imagi idealan mondlingvon. Formiĝis du neesperantistaj grupoj kaj tria konsistanta el esperanto-parolantoj. La esprimitaj ideoj estis interesaj: Ekzemple unu grupo proponis helpi komunikadon per mansignoj por preventi kulturajn miskomprenojn. Alia proponis pleniĝi la vortprovizon per elementoj el diversaj kulturoj, ekzemple la vortaro pri neĝo-specoj inuita povus konveni. Kompariĝis diversaj solvo-provoj kun la esperanta. Kaj konkludiĝis, ke esperanto kapablas taŭge esprimi multajn nuancojn, sed ke eble precizaj fakvortoj de rapide evoluantaj sciencoj parte mankas, kaj ke la vortprovizo avantaĝas la eŭropanojn.

De la 10-a ĝis la 16-a horo funkciis stando, kiun prizorgis Myrta Fischer

(la patrino) kun kelkaj helpemaj klubanoj. Disponeblis kelkaj interese verkitaj kaj plaĉe prezentitaj flugfolioj kaj informiloj. Interalie ili menciis renkontiĝojn organizatajn de *Esperanto-Land*, kiujn klubanoj partoprenis.



Fotis Wolfram Fischer

Laborgrupo en la debato

La standon vizitis personoj ne timantaj pluvan veteron. Ekestis viglaj interparoloj. Tre favora momento estis, kiam la publiko vice atendis antaŭ-manĝaĵon, kiun nia stando proponis: keksojn en formo de verda stelo. Multaj malsatantoj tiam komencis babiloj kaj informiĝi pri tiu nekonata afero nomata «Esperanto».

Kio okazos venontjare ?

La klubanoj kontentas pri tiu eksperimenta tago kaj jam pripensas ankaŭ venontjare partopreni en SUFO, des pli, ke tiam verŝajne pli belos la vetero !

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-

Seefeld. Tel. : 044 251 50 25

info@esperanto.ch

Reto : www.esperanto.ch/zuriko

Redaktas : Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9302 Kronbühl, rischneller@gmail.com
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Ĉu la tuta mondo suferas pro afazio ?

Unua parto

Prelego (forme reverkita) prezentita dum la Printempa Semajno Internacia en Bonn la 3-an de aprilo 2007 kaj dum la SES-Tago en Ĝenevo la 28-an de la sama monato de la sama jaro.

• *Claude Piron*

Kial mi interesiĝis pri afazio

Mi unue klarigu, kial mi interesiĝis pri afazio rilate al la monda lingvo-problemo kaj al Esperanto. Afazio estas malsano, kaj anstataŭ tiu fakvorto oni povus diri *senlingveco*. La malsano konsistas el tio, ke homo, kiu antaŭe parolis, jen ĉesas povi glate, normale esprimi sin. En iuj kazoj la perdo de parolo estas tuta, en aliaj ĝi estas nur parta. Mi parolos pri la kaŭzoj kaj simptomoj pli poste. Nun mi volas nur diri al vi, kial la afero ekŝajnis al mi interesa por esperantistoj.

Kiel vi scias, mi estas psikologo kaj psikoterapiisto. Unu el la aferoj, kiujn mi profesie faras, estas akcepti homojn, ĉefe junajn, kiuj laboras aŭ komencas labori en tiu aŭ alia fako de psikologio, kaj helpi ilin plenumi siajn profesiajn devojn. Oni ĝenerale nomas tiun agadon *kontrolo* aŭ *superrigardado* ; fakte temas pri helpado de iu sperta al iu nesperta per rerigardo al tio, kiamaniere la ankoraŭ ne tre sperta profesiulo traktis tiun aŭ alian kazon.

Konkrete, la afero prezentiĝas jene. La persono vizitas min unu- aŭ dufoje ĉiusemajne kaj priskribas, kiel li aŭ ŝi pritraktis ĉu unu kazon, ĉu plurajn, depende de nia interkonsento. La celo de tiu aranĝo estas triobla.

Unue, aŭdante, kion la kolegoj – ĝenerale junaj kolegoj – rakontas pri la persono, kiun ili pritraktas, mi povas helpi ilin pli bone kompreni la kazon. Fakte, eĉ se mi diros nenion, venos pli bona kompreno, simple ĉar kiam oni raportas, kio okazis, oni atingas pli klaran vidon al la afero. La simpla fakto devi esprimi per vortoj sian travivaĵon helpas pli bone kompreni ĝin. Sed krome, ĉar mi havas multjaran sperton pri tiaj kazoj, mi ofte rimarkas ion, kion la juna psikologo preteratentis, aŭ el kio ŝi aŭ li tiris malĝustan konkludon, aŭ mi rimarkas, ke li aŭ ŝi pretervidis la bezonon informiĝi pri tiu aŭ alia punkto por havi klaran bildon pri la tuta kazo, ktp. Ofte, ankaŭ, mi komprenas aferojn, kiujn la alia ne komprenis pro troa proksimeco al la paciento. Por havi bonan superrigardon al kompleksa kazo, vi bezonas rigardi ĝin je iu distanco.

La dua avantaĝo de la aranĝo estas, ke, se vi troviĝas je la unua linio de la fronto, se tiel diri, vi ne havas la tempon pripensi pri ĉio, vi devas reagi tre rapide, kaj estas bone poste

reripensi la tutan aferon kaj diri al iu alia, kio okazis, por pli bone konscii eventualajn erarojn aŭ pensi pri alia, eble pli efika, maniero reagi. Fakte, kvankam multaj personoj ne scias, ke tiu rerakonto de psikologa laboro al pli sperta kolego, entute ekzistas, ĝi fakte estas la ĉefa fonto de kompreno pri tio, kion oni devas aŭ povas fari. Per tiu konsultado al pli sperta kolego oni lernas la profesion. Ĉefe, oni lernas pri si mem. Oni ekmalkovras, kial propra komplekso, propra problemo, propra karaktero trajto ludas rolon en la maniero pritrakti la kazon, kaj fojfoje ĝene enŝoviĝas. Kaj tiu lernado pri si mem estas tre grava aspekto de psikologa, kaj ĉefe psikoterapia, laboro. Ekzemple, se vi ne rimarkis, ke vi parolas kun la paciento almenaŭ tiom por impresi lin, por imponi al li, kiom por helpi lin progresi al pli bona, psike pli sana vivo, multo estos fuŝata en la efiko de viaj paroloj aŭ sintenoj sur la pacienton. Kaj por rimarki, ke oni tiamaniere fuŝe laboras, necesas, ke iu ekstera tion komprenu kaj klarigu al vi, ĉar homo ĝenerale ne ŝatas fronte vidi la proprajn mankojn, kaj la homa psiko havas grandan stokon da tre efikaj taktikoj kaj strategioj por eviti vidi ion, kio malplaĉas al ĝi.

Trie, tiu raportado pri tio, kio okazas inter la paciento kaj la «psikisto», estas tre ofte utila, ĉar la amplekso de la respondeco, la seriozeco de la kazo, la graveco de la koncentriĝo necesa por helpi al severe suferanta homo, aŭ al homo en ŝajne senelireja situacio, kaŭzas angoron, aŭ aliformajn streĉiĝojn, el kiuj oni povas parte liberigi sin diskutante kun komprenema, kompetenta, pli sperta kolego. La juna psikologo sentas sin malpli sola. Estas iu, kiu helpas, subtenas, konsilas, kaj tio

gravas por konservi sian psikan ekvilibron, kiam oni konstante alfrontas malfacilajn situaciojn kun granda respondeco.




Foto: Sanjiv Keller

Inter la kolegoj, kun kiuj mi ludas tiun rolon, venas al mi, ekde eble unu jaro, juna parolterapiisto. Terapiistino, fakte. Ŝia laboro estas kun personoj, kiuj havas problemojn koncerne sin-esprimadon. Povas esti infanoj, kiuj, pro io fuŝa dum naskiĝo, havas cerban difekton, kaj kiuj neniam parolos, sed kiujn oni povas helpi esprimi sin alimaniere ol buŝe; povas esti homoj, ĉe kiuj sangovaskulo en la cerbo rompiĝis, kaj kiuj pli malpli amplekse paralizigiĝis kaj samtempe perdis la kapablon esprimi sin, ĉu parte, ĉu tute, povas esti ĉiaspecaj problemoj ligitaj al la kapablo bone paroli.

Fakte ŝi laboras en du institucioj, unu por infanoj, kaj alia por plenk-

kreskuloj, kiuj havas sanproblemojn, kies kaŭzo kuŝas en la cerbo.

Pri la teknikoj, kiuj ekzistas por helpi la homojn paroli, mi estas tute nekompetenta. Ne per tio do mi povas helpi al ŝi. Ŝi bone, ĝisfunde konas sian fakon, dum mi havas pri ĝi nur minimumajn sciojn. Kion ŝi atendas de mi, tio rilatas al du aspektoj de ŝia laboro. Unu estas la rilato kun la paciento, el la vidpunkto senta, emocia. Temas ĉi-punkte pri la sintenoj, kiuj povas helpi aŭ malhelpi, la maniero paroli, la maniero agi, por krei kiel eble plej efikan rilaton kun la paciento. Kaj la dua estas subteno, apogo al ŝi. La homoj, kiujn ŝi gvidas al reaktiro de la kapablo paroli, ofte tiom suferas, aŭ tiom malagrade reagas, ke ne estas facile elporti ilin, unu post la alia, dum plena labortago. Tiu laboro postulas nervan rezistemon, serenecon kaj aliajn belajn kvalitojn, kiujn eblas konkrete teni tuttage nur koste de granda laceco. Fine de la semajno ŝi estas elĉerpita. Kaj kundividi la streĉojn rakontante al iu, kiu sufiĉe komprenas, kion ŝi travivis, kaj montras sian komprenon per la propraj reagoj, estas kvazaŭ enspiro de aero ĉe iu, kiu pretas sufokiĝi. Ŝi laŭ mi laboras tre bone, kaj mi tre admiras ŝin.

Ŝia laboro kun mi do estas la faktoro, kiu ekkaŭzis, ke mi komencis rigardi la tutmondan lingvoproblemon el la vidpunkto de afazio.

Aliaj ekzemploj

Sed kiam mi komencis pripensi laŭ tiu vojo, venis al mi aliaj ekzemploj, kiujn mi travivis antaŭ ol mi ekrilatis kun tiu juna virino, kiu praktikas parolterapieton. Ekzemple mi memoris pri knabino, kiun mi siatempe konis,

kaj kiu komencis paroli nur je la aĝo de dek du jaroj. Dum dek du jaroj, ŝi ne parolis. Estis klare, ke ŝi komprenas, kion oni diras al ŝi, sed neniam vorto eliĝis el ŝia buŝo. Se oni starigis al ŝi demandon, ŝi ne respondis, aŭ nur per kapmovo aŭ alia gesto (poste, eventuale, skribe). La gepatroj kompreneble estis tre angorigitaj de tiu stranga konduto. Ili konsultis ĉiaspecajn fakulojn, sed neniu sukcesis kompreni, kial ŝi ne parolas. Ŝi ja tute ne estis surda. Ŝi ankaŭ ne estis mense handikapita, ŝia inteligenteco estis tute normala. Ĉio fizika estis normala. Tamen ŝi ne parolis.

Sed la plej stranga afero estas, ke subite, kiam ŝi estis dekdujara, ŝi ekparolis. Kaj ŝi ekparolis perfekte. Dum dek du jaroj ŝi diris nenion, kaj jen ŝi komencas esprimi sin parole, kaj ŝi perfekte prononcas, ne faras pli da gramatikaj eraroj ol la aliaj dekdujaruloj, kaj havas vortprovizon egalan al ĉiuj knabinoj ŝiaaĝaj (kio estis normala, ŝi ja legis librojn kaj revuojn). En unu nokto ŝi transiris de senparol-eco al perfekta regado de lingvo kaj parolo. Oni neniam komprenis, kio estis la kaŭzo de ŝia ŝajna muteco. Klare, ĝi estis pure psikologia. Oni povas esprimi ĝin dirante, ke ŝi *rifuzis* paroli. Sed kial? Kaj kial ŝi ŝanĝis sian decidon? Tion nur ŝi scias. Aŭ eble eĉ ŝi ne scias. Multo en homo estas nekonscia. Kaj ĉar la laboro kun la nekonscia parto de la psiko estas la ĉefa parto de mia profesia okupiĝo, nenio mirigas min tiukampe.

La interesa aspekto de tiu kazo estas tiu stranga konstato, ke oni povas lerni paroli sen ekzerci sin. Aŭ ĉu ŝi kaŝe ekzercis sin? Ĉu nokte, en sia lito, ŝi kaŝis sin sub la kovriloj kaj ekzercis sian langon, sian palaton, sian gorĝon, siajn voĉkordojn? Ni ne scias.

Sed ke nia cerbo estas kapabla lerni ion similan sen konkreta ekzercado, tion mi eksciis per alia kazo. Fakte temas pri la najbaro, kiu estis plej proksima al nia domo, dum ni loĝis en Coppet. Ilia ĝardeno tuŝis nian ĝardenon. Pli proksimaj ni ne povus esti. Li estis usonano, ŝi estis francino.

Foje, post kiam li jam emeritiĝis, li volis ŝanĝi vitron en la fenestro, kiu havigis lumon al ŝtuparo kondukanta kelen. Li bezonis ŝtupetaron por atingi la lokon, kie nova vitro estis bezonata, sed kompreneble meti ŝtupetaron sur ŝtupojn ekvilibre ne estas facile, povas esti neeble; mi ne scias, kiel profesiuloj elturniĝas en tia cirkonstanco. Kiel ajn estu, li ne sukcesis meti la ŝtupetaron kun ĝusta ekvilibro, kaj kiam li tenis la vitron ambaŭmane, li renversiĝis malantaŭen, kaj dum li falis lia nuko fortege batis la muron, kaj severe vundiĝis. Fakte grave vundiĝis la cerbo. Dum kelka tempo eĉ ne estis klare, ĉu li sukcesos plu vivi. Li vivis, sed la lezo, la damaĝo en la cerbo estis tiel severa, ke li neniam plu povis konduti kiel plenkreskulo. Liaj kapabloj estis reduktitaj al tiu de kvinjara aŭ sesjara knabo. Sed la stranga afero estas, ke kiam li rekomencis paroli, li absolute ne plu havis la tre fortan usonan akĉenton, kiun li havis antaŭe, kiam li parolis france. Li ĉiam bone parolis la francan, vorte kaj gramatike, sed kun tre forta usona maniero prononci. Post la akcidento, li elparolis kiel denaska franclingvano. Tio pruvas, ke lia cerbo stokis ĉiujn informojn necesajn por prononci kiel franclingvano, iel asimilis, kiel ĝuste pozicii la langon, kiel tuŝi per ĝi la palaton aŭ la dentojn, kiel regi la fluon de aero, ktp. Ĉion ĉi lia cerbo registris kaj tenis en si. Sed kial antaŭe li parolis sen uzi tiujn in-

formojn? Kaj kiel eblas uzi ilin ĝuste sen ekzerci sin? Pri la dekdujara knabino, kiun mi priparolis antaŭe, oni povas supozi, ke ŝi kaŝe ekzercis sin. Sed pri ĉi tiu viro tute ne. La homa funkciado, kaj ĉefe la funkciado de la cerbo, estas plena je misteroj.

Propra plej angoriga okazaĵo

Sed ne nur tiuj kazoj igis min revizii mian opinion pri la lingvoproblemo rigardante ĝin el la vidpunkto de afazio. Kiel vi tuj facile komprenos, grave rolis ankaŭ mia propra kazo. Mi troviĝis plurfoje en tre timigaj situacioj, en mia vivo, proksime al morto, sed la plej angorigaj minutoj, kiujn mi travivis, estas tiuj, pri kiuj mi nun raportos.

La afero okazis foje, kiam mi estis treege laca. Elĉerpita, fakte. Mi dum kelkaj semajnoj havis tro da taskoj en diversaj asocioj, en kiuj mi havis respondecojn, tro da problemoj kaj kunvenoj en mia instrua laboro en la universitato, kaj tro da tro severe pezaj kazoj en mia terapia laboro. Mi do estis elĉerpita. Kaj jen mi devis iri al Laŭzano por atesti en jura proceduro, en kiu unu el miaj ekspacientoj estis envolvita. Ĝenerale por iri al Laŭzano, kiu troviĝis je kvardeko da kilometroj de mia tiama hejmo, mi veturis aŭtomobile. Sed tiun posttagmezon mi sentis min tiel laca, tiel nerve senforta, ke mi diris al mia edzino: «Ne plaĉas al mi la ideo ŝofori ĉi-foje, mi ne fidus min, mi estas tiel dormema, ke mi riskus kaŭzi akcidenton, mi preferas iri trajne». Trajne do mi tien veturis. Kiam mi alvenis en la konstruaĵon, kie troviĝis la tribunalo, pedelo petis min atendi. «Sidu ĉi tie», li diris, «oni vokos vin.» Nu, mi sidis en la atendejo. Mi sidis, sidis, sidis, kaj nenio okazis.

Se mi estus en mia normala stato, mi certe serĉus iun por demandi, kio okazas, sed mi estis tiel senforta, ke mi ne sentis emon ekstari de sur mia seĝo. Fine, ĉirkaŭ la 18-a horo, alvenis tiu sama pedelo, kiu diris al mi. «Kion vi faras ĉi tie?» Mi diris: «Nu, vi petis min atendi ĝis vi vokos min. Mi venas por la afero tiu kaj tiu, kiel atestanto.» – «Ho, pardonu», li tiam diris, «tiu kazo estas prokrastita. La juĝisto pritraktos ĝin nur post du semajnoj. Erare oni preteratentis vin.» Mi estis furioza, ke oni devigis min perdi tutan posttagmezon, sed mi estis tiel laca, ke mia kolero ne sukcesis esprimi sin. Mi sentis la konflikton en mi, la streĉiĝon inter la parto de mi, kiu furiozas kaj volus montri sian koleron, kaj la tro laca nerva sistemo, kiu ne povis provizi la necesajn gestojn kaj vortojn por tio. Mi do reiris al la stacidomo kaj revenis hejmen.

Mia edzino atendis min por la vespermanĝo. Ni komencis manĝi, kaj ni interparolis, kiel kutime en tia situacio. Sed je unu momento – ege timiga momento – mi volis diri ion precizan, sed konstatis, ke mi ne povas. Mia buŝo rifuzis. Anstataŭ prononci la vortojn, kiujn mi volis, ke ĝi eligu, mi aŭdis, ke ĝi diras «boŭa boŭa boŭa» aŭ ion similan. Kompreneble tuj venis terura angoro. Mi vidis, ke mia edzino, kiu sidis vid-al-vide de mi, rigardas min kun horora esprimo sur la vizaĝo. Ŝi certe pensis la samon, kiel mi. «Damaĝo en la cerbo, apopleksio aŭ io simila.»

Mi tiam travivis ion tre strangan. Mi disdubiĝis. Mi dividiĝis en du partojn. Parto de mi estis kiel terurata infaneto, kiu pensas: «Mi ne plu funkcias normale, io fuŝiĝis en mi, eble mi neniam plu kapablos esprimi min, kia estos de

nun mia vivo?» Kaj alia parto de mi reagis kiel profesiulo. Mi kompreneble lernis pri afazio kaj tiaj aferoj, kiam mi lernis pri la cerbo dum miaj studoj. Parto de mi do malvarme, racie analizis la situacion. Apud la angora, timpremata bubo, kaj sentante ĉiujn emociojn de tiu, sidis rezonanta profesiulo. En kelkaj sekundoj tiu parto de mi faris tutan serion da observoj, rezonoj, testoj kaj konkludoj, kiel oni normale faras por diagnozi. Mi pensis: «Mi scias, kion mi volas diri. La frazo, kiun mi volas prononci, estas tute klara en mia cerbo, oni povus diri: nete tajpita sur la ekrano de mia cerba komputilo. Mi scias, kion mi volas diri, kaj mi konas la vortojn kaj la gramatikon. La lingvo ne mankas al mi. La centro de lingva regado en mia cerbo do ne estas tuŝita. Ankaŭ mia kapablo klare pensi kaj rezoni ne estas tuŝita. Mi konstatas, ke mia memoro pri ĉio, kion mi studis pri tiaj kazoj, estas senmanka. Mi povas uzi ĝin por kontroli tion kaj tion, kaj atingi fidindajn konkludojn al miaj hipotezoj. Nur la *mova* aspekto de parolado estas fuŝita. Mi donas ordonojn al mia buŝo, al mia gorĝo, al mia lango, al miaj pulmoj, sed ili ne obeas. Estas kiel en aŭtomobilo, en kiu la stirilo normale turniĝas, la radoj ne estas difektitaj, sed la transdona ligilo inter la stirilo kaj la radoj – la *transmisio*, fakvorte – ne funkcias, do, kiel ajn oni turnas la stirilon, la radoj ne obeas.»

Dum eble kvin minutoj mi tiel rezonis kaj observis, kio okazas en mi, ege angorplena unuflanke, kaj klare pensanta aliflanke. Kaj post tiuj kvin minutoj mi subite repovis paroli. Granda senpeziĝo aperis sur la vizaĝo de mia edzino. Kaj certe ankaŭ sur mia. Kaj mi povis tute normale rakonti, kion

mi ĵus travivis. Kio okazis, plej probable estas, ke vaskulo en la parto de la cerbo, kiu regas la movojn de la parol-organoj, ne rompiĝis, sed dummomente pinĉiĝis, haltigante la fluon de sango en tiu regiono, tiel ke la koncerna cerbo-parto ĉesis kelkminute funkcii.

Ekde tiu tago, mia rilato al handikapuloj komplete ŝanĝiĝis. Ek de la afazia travivaĵo mi scias proprasparte, ke oni povas havi menson, kiu intelektu funkcias perfekte, kaj tamen aspekti kiel profunda idioto.

La simptomoj de afazio

Nun ni revenu al la termino «afazio». Fakuloj pri tiu kampo distingas parolon disde lingvo. Se iu malfacile artikulacias aŭ prononcas, oni diras: «La perturbo situas je la nivelo de parolo.» Se iu malfacile trovas la deziratan vorton, malfacile kombinas vortojn por formi frazojn, aŭ eĉ malfacile komprenas la signifon de io dirita aŭ skribita, oni diras: «La perturbo situas je la nivelo de lingvo.»

La ĉefaj simptomoj de afazio estas la jenaj:

1. *La bezonata vorto mankas*, ne venas en la menson. Estas simile al la situacio, kiam vi serĉas la nomon de persono, sed vi ne trovas ĝin, tamen vi sentas, kvazaŭ ĝi kuŝus tute proksime. En la franca oni diras: «Tiu nomo estas sur la pinto de mia lango.» La preciza nomo ne formiĝas en via menso, sed vi havas malprecizan, nebulan ideon pri ĝi. Vi diras: «Kiel diable tiu nomiĝas?» Kaj vi pensas: «Mi preskaŭ trovis ĝin.» Kelkfoje eĉ: «Estas nomo, kiu komenciĝas per tiu aŭ tiu litero.» Sed fakte vi ne trovas. En simila situacio, ofte, afaziuloj simple rezignas. Ili ne finas frazon, kiun ili ĵus komencis. Temas, ne pri perturbo de la memoro, sed pri

malfacileco trovi ion, kio estas ie en la memoro, sed oni ne scias, kie. La serĉata vorto povos reaperi poste, senprobleme, en alia situacio.

2. *Malpliĝas esprimado*. Afaziuloj ne multe esprimas sin. La kvanto de vortoj produktataj estas reduktita. Ili ofte respondas al demando simple per «jes» aŭ «ne». Ili serĉas siajn vortojn kaj ofte ne sukcesas formi frazon. Same al ili povas esti malfacile skribi. Kelkaj kapablas nur skribi sian nomon aŭ formi kelkajn literojn.

3. *Prononco estas nenormala*. Ĝi povas esti malpreciza, aŭ tro akcentata. Ĝenerale la koncernato parolas malrapide. Ofte ne estas facile kompreni, ĉar la sonoj estas misformataj aŭ la artikulacio nesufiĉe klara. Kelkaj, kiel okazis al mi, tute ne povas formi vortojn aŭ frazojn: la buŝo ne kapablas obei la ordonojn de la menso, ĝi produktas sonojn, sed, strangajn – miakaze ili estis tre obtuzaj – tute aliajn ol tiuj, kiujn la persono volas eligi.

4. *Fojfoje afaziuloj eraras pri vorto*. Ekzemple ili diras: «Mi serĉas miajn okulcitrajn» anstataŭ «Mi serĉas miajn okulvitrojn» aŭ ili translokas la fonemojn de vorto, dirante ekzemple «Tiu infano estis malbone turnita» anstataŭ «nutrita».

5. *Afaziuloj malfacile komprenas*, kion oni diras al ili, eĉ se ili bone aŭdas. La samo povas rilati al legado. Afaziuloj povas ne kompreni tekston skribitan.

Ĉu ĉiuj ĉi trajtoj ne elvokas al vi ion bone konatan? Ili estas ekzakte la samaj karakterizoj, kiujn oni povas observi, se iu troviĝas en medio kun fremda lingvo. Oni tiam serĉas la vorton, kiu esprimas la koncepton tute klaran, kiun oni havas en la menso. Oni faras gramatikajn erarojn. Oni malpli

esprimas sin. Oni emas respondi per jes aŭ ne, kaj por simpligi situacion, sentatan kiel ege komplikan, postulantan tro grandan mensan fortostreĉon, oni rezignas diri ĉion, kion oni emus diri. Oni prononcas nenormale. Oni uzas vorton anstataŭ alia. Oni malbone komprenas.

Laŭ mi estas tute prave diri, ke, kiam homoj estas en medio, kie oni parolas alian lingvon, ol la gepatran, ili kondukas kiel afaziuloj, ĉu estante tute mutaj kaj senkomprenaj, ĉu kun treege reduktita kaj ofte fuŝa maniero komuniki.

Kelkaj eble rebatos al mi, ke oni uzas la vorton «afazio» nur pri kazoj, kiam la persono antaŭe kapablis lingve komuniki, kaj *perdis* tiun kapablon, dum, se temas pri fremdlingva medio, neniam ekzistis la kapablo paroli. Sed tiu kapablo ja ekzistis antaŭe! Kiam la koncernatoj estis en sia lando, en sia familio, kun siaj amikoj, ili tute bone esprimis sin. Estas do pravigite paroli pri perdo de la kapablo komuniki ligita al trapaso de lingva limo. Antaŭe, sia-regione, ili kapablis lingve aŭ parole komuniki. Kaj jen, en la nova medio, ili ne plu kapablas, ili perdis tiun kapablon. Estas ekzakte la samo kiel pri afaziuloj.

La kaŭzoj

Kio diferencigas la situacion de tiu, kiu troviĝas en fremdlingva medio disde la aliaj kazoj de afazio, tio estas la kaŭzo. Sed afazio estas kampo tre vasta kaj kompleksa. Ĝi inkluzivas diversajn kaŭzojn.

Estas ekzemple la afazio, kiun kaŭzas fuŝo fizika, afazio «somatogena», oni fakvorte diras. Tio estas: la kaŭzo, pro kiu la koncernato perdis la kapablon paroli, kuŝas en la materia orga-

nizo, fuŝita pro malsano aŭ akcidento, de la cerbo. Okazis lezo, okazis damaĝo, ekzemple sangovaskulo rompiĝis, aŭ ŝtopiĝis, aŭ aperis tumoroj, kiu premas la nervajn ĉelojn, la neŭronojn, kaj malhelpas ilin normale funkcii, aŭ okazis alia konkreta, korpa, fizika evento, kiu malebligas la normalan funkciadon de la parto de la cerbo kiu regas la kapablon paroli aŭ kompreni. Tiu estas la formo de afazio, pri kiu oni plej ofte parolas.


Sed ekzistas ankaŭ psikdevena afazio. La knabino, pri kiu mi parolis antaŭe, kiu dum dek du jaroj ne eligis unu frazon, eĉ ne unu vorton, kvankam ŝia cerbo, ĉiuj parol-organoj kaj ŝia tuta nerva sistemo perfekte funkciis, kaj kvankam ŝi estis normale inteligenta, fariĝis dum tiu periodo afaziulino nur pro propra decido, aŭ almenaŭ pro ia psikologia reago al ni-ne-scias-kio. Estas multaj similaj kazoj. Ekzemple infano, kiu tute normale parolis, povas ĉesi esprimi sin post kiam ĝi estis sekse perfortita. La atenco estas io tiel nekomprenebla, vunda, damaĝa kaj kulpiga – tio estas la punkto, kiu ĉiam plej mirigis min, nome ke homo sekse atencita, do viktimo, anstataŭ senti sin viktimo, aŭ eĉ sentante sin viktimo, tamen sentas sin kulpa pri la afero, kvankam ŝi aŭ li absolute ne deziris ĝin kaj ne ĝuis ĝin – do la atenco povas esti tiel nekomprenebla kaj kulpiga, ke la viktimo ĉesas paroli. La ŝoko estis tro forta. Ne eblas diri. Ne eblas esprimi. Do oni rezignas pri esprimado. Io simila povas aperi post bombado aŭ similaj militaj okazoj. Multaj infanoj en Irako ĉesis paroli, ĉar ili travivis nedireblajn okazaĵojn. En tiaj kazoj oni parolas pri psikdevena afazio. Ĝenerale ĝi ne estas definitiva, sed kelkfoje jes.

(La sekvo en SES informas 3/2007)

Arte malambicia, sed psikologie instiga delicaĵo

*Ŝtimec, Spomenka. Hodler en Mostar.
Pisa: Edistudio, 2006. 105 paĝoj.*

Unue mi ne tro komprenis, kun kiu(j) celo(j) Spomenka Ŝtimec verkis tiun libron. Kiam mi starigis al ŝi tiun demandon, ŝi respondis, ke la celoj estis: “Beletre vivigi unu el la modelinoj de F. Hodler por stimuli legantojn interesiĝi pri la reala Hodler patro kaj Hodler filo. Atentigi ke en Sarajevo, la urbo kiu ege suferis, troviĝas io rilatanta al nia Esperanto-kulturo”. Kun tiuj klarigoj mi kredis, ke mi pli bone komprenos kaj rekomencis legi la libron. Traleginte la tekston, mi tute ne bedaŭris, ke mi prenis la tempon por tion fari. Des pli ĉar en 2006 mi havis la okazon viziti la ĉefurbojn de Bosnio kaj Hercegovino.



Kiel (eble ne ĉiam vaste) konate, Hector Hodler, la fondinto de Universala Esperanto-Asocio en Ĝenevo en 1908, estis la filo de la svisa nacia pentristo Ferdinand Hodler (1853-1918). Sed Hector ludas nur marĝenan rolon en la nova libro de Ŝtimec. Multe pli en la centro de la atento staras Jeanne Charles-Cerani-Ĉiŝić.

Ĉi tiu franca virino, kiu venis el Liono en Svislandon dank' al stipendio, servis al Hodler kiel modelino (kaj amatino) inter 1901 kaj 1916. Tiukaze ŝi kolektis aŭ heredis de li centon da pentraĵoj. Fakte dum longa tempo la vizaĝo de Jeanne ornamis la 50-frankan biletan de la Svisa Nacia Banko.

Post la morto de la muzikisto-dirigento Antoine Cerani, la edzo de Jeanne, kaj de Valentine Godé-Darel (en 1914), kiu estis alia amatino de Hodler, kun kiu li eĉ havis filineton (kiu fariĝis la duonfratino de Hector kaj estis poste adoptita de Berthe Hodler), Jeanne eklaboris kiel flegistino en la hospitalo, kie ŝi devis asisti operaciojn ĉe militviktimoj kaj flegi ilin. Tiukaze ŝi konatiĝis kun Mehmed Ĉiŝić el Mostar en Bosnio-Hercegovino, al kiu ŝi edziniĝis kaj kun kiu ŝi veturis al Usono kaj Kanado, kie la diplomato reprezentis la jugoslavian registaron. Jen do la interesa konekto inter Hodler kaj Mostar-Sarajevo, kiu kondukis ĉe la kroata verkistino al la ideo skribi la fragmentecan biografion de la Hodler-modelino. Kun sia Meho Jeanne do havis la okazon veturi al Jugoslavio – Beogrado, Mostar, Niš – kaj konatiĝi kun la arkaika mondo de Balkanio, kiu

tiutempe ankoraŭ estis forte influita de la turka mentaleco. Ŝtimec uzas en sia rakonto aron da turkaj etnografiaj vortoj, kiuj donas al la teksto eĉ iom ekzotan ĉarmon.

Jeanne mortis en 1955 en Mostar, tre baldaŭ post ŝi ankaŭ Meho mem. Postrestis 280 Hodler-pentraĵoj, pri kiuj la direktoro de la Artista Galerio en Sarajevo interesiĝis. En 1966 estis subskribita kontrakto kun la heredantino Emina Korkut pri la aĉeto de la kolekto. En aprilo 1978 parto de la kolekto estis prezentita en la Artmuzeo de Berno, denove en 1998 en alia ekspozicio en Olten. Aperis akompanaj katalogoj (kun interesaj klarigaj tekstoj pri la vivo de Jeanne ktp.). La iom sensacia specifaĵo de tiuj bildoj estas, ke unu triono enhavis intervenojn de la posedantino, do ili evidente estis surprintritaj de Jeanne. Pro ŝia fuŝado Jeanne ne estis aparte ŝatata ĉe la Hodler-amantoj. Kiam en Sarajevo eksplodis la milito en 1992, la Hodler-artaĵoj estis ŝirmitaj. Post la militfino estis rimarkite, ke pluraj pentraĵoj eĉ malaperis. Plurajn bildojn trafis militdamaĝoj, kaj ili devis esti restaŭritaj; oficialaj svisaj instancoj investis duonmilionon da frankoj por la renovigo de la muzeo mem. En 1998 povis esti prezentita en Sarajevo centdudeko da hodleraj verkaĵoj. Tiel la nekutima trezoro fariĝis daŭre alirebla al la interesata publiko.

La biografia-historia-geografia rakonto en 23 ĉapitroj de Spomenka Ŝtimec pri Jeanne Charles-Cerani-Ćišić, kiu portis la animon (aŭ spiriton) de Ferdinand Hodler al Mostar kaj Sarajevo, estas lingve senpretenda teksto, ĉar verkita en iom tro simpleca stilo. Kiel temo ĝi tamen vekas intereson

precipe por legantoj, kiuj havas ian rilaton al Ferdinand Hodler kaj ties filo Hector, kiu iel hazarde kaj senkulpe aperis en tiu mondo kiel frukto de unu el multaj pli malpli hazardaj amaferoj de sia patro. Tamen bone ke ekzistis tiuj amaferoj kaj tiuj homoj. Kaj bone ke la sentema zagreba verkistino, kies fokuso celas la virinan psikon, eluzas sian talenton por krei psikologian beletron.



Persone mi dezirus, ke la verkema kroatino altigu sian Esperanto-lingvonivelon, pli forte eksperimentante per la reale ekzistanta Esperanto-vortrezoro, por ke ŝiaj verkoj fariĝu lingve malpli tedaj kaj por ke oni povu pli facile imagi ŝin kiel indan Nobel-literatur-kandidaton. Ĉar mankas fontindikoj oni ne scias, sur kiuj dokumentoj Ŝtimec baziĝis kaj kio estas realo kaj kio fikcio en ŝia rakonto. Plurajn erarojn (Holder, ridesklopodis, evoluigi – ne evolui – diskutojn, survoje k.s.) oni povintus eviti. La traduko de la libro al la franca aŭ germana lingvo estas por mi imagebla.

Andreas Künzli

La Ondo de Esperanto, 5/2007 (151)

Kio estas GPS?

Tutter(Glob)a Pozicitrova Sistemo (angle *global positioning system*, mallonge GPS), ankaŭ nomata bira* sistemo, estas satelita loktrova teknikaĵo uzata por determinado de ekzakta geografia pozicio kaj provizanta tre ekzaktan spacan referencon preskaŭ ĉie ajn sur la planedo aŭ en la tera orbito. Ĝi ekfunkciis oficiale en julio 1995. Ĝi uzas aron de almenaŭ 24 satelitoj ĉe la meza tera orbito. Por determini la ekzaktan lokon (kutime la akurateco estas malpli ol 10 metroj), la birilo* devas ricevi la signalon de almenaŭ kvar satelitoj. GPS-signalon estas komparebla al terfrekvenca radio – ĝi funkcias nur unudirekte. Normala birilo ne sendas datumojn reen al la satelito. Do oni ne bezonas timi, ke oni estas prispionata.

Sufiĉas indiki al la birilo la landon, urbon, straton kaj numeron de la celloko, kaj post kelkaj sekundoj aperas sur la ekrano la distanco al la loko, la vojo kiun oni sekvu, la tempo bezonata, ktp. Komprenoble oni povas alternative simple tajpi la koordinatojn – ekz. la federacia domo en Berno troviĝas ĉe N 46° 56.83' E 7° 26.65' (longitudo kaj latitudo), aŭ, laŭ la svisa koordinata sistemo (swissgrid), ĉe 600421 / 199565.

La plej konataj biriloj estas la navigadsistemoj por aŭtoj, sed ekzistas ankaŭ man-konvenaj biriloj por biciklantoj, promenantoj ktp. Ankaŭ iuj

trajnoj kaj aliaj publiktransportaj veturiloj uzas la biradan sistemon, i.a. por informi la pasaĝerojn pri la pozicio kaj daŭro ĝis la sekva stacio.

Biriloj (prezoj ekde 250 frankoj) estas tre konvenaj iloj en poŝformato, la pli altnivelaj el ili estas ne nur pli bona kompasoj, sed enhavas kompletan stratan mapon de tuta lando aŭ eĉ tuta kontinento. Kaj troviĝas sur tiuj mapoj multaj aliaj informoj (ekz. pri plej proksimaj bankmaŝinoj, restoracioj, benzinejoj, vidindaĵoj ktp.). Tiuj informoj estas storataj en la birilo mem, kaj ili povas komprenoble malaktualiĝi. Fojfoje do necesas ĝisdatigo de la mapa materialo, kio povas okazi perkomputile.


Plioftiĝas nuntempe poŝtelefonoj kaj poŝkomputiloj, kiuj enhavas birilojn.

Geokaŝado – nova ludo turisma kaj sporta

Dank' al la supre menciita loktrova sistemo (GPS), nova tutmonda hobia kreiviĝis (en la jaro 2000): geokaŝado (aŭ geokaŝumado, geokaŝludo, angle *geocaching*) estas ludo ĉe la limo de sporto kaj turismo, kiu konsistas en la utiligo de la GPS por serĉi kaŝitajn objektojn (kaŝuojn), pri kiuj oni scias nur ties geografiajn koordinatojn. Por la serĉado oni uzas ordinaran poŝformatan GPS-birilon. Persono okupiganta pri geokaŝado nomiĝas geokaŝanto aŭ geokaŝisto (depende de la

adepeteco – kaj geokaŝado estas dependige amuaza por certaj homoj).

Tutmonde ekzistas jam pli ol 400 000 tiaj kaŝitaj ujoj, en Svisio troviĝas ĉirkaŭ 3600 (majon 2007). Aperas novaj ĉiun tagon, kaŝitaj de kunludantoj kreemaj. Svisio estas post Skandinavio la plej aktiva geokaŝada regiono en Eŭropo. La ludo havas altan taŭgecon ankaŭ por familioj. Iuj serĉas grupe. Tutmonde ekzistas jam pli ol 40 000 ludantoj.



Kompasso de la 21a jarcento: GPS-birilo.

La kaŝujoj – multegaj el ili troviĝas ĉe aŭ apud vizitindaj lokoj – havas diversajn grandecojn. Kelkaj estas nur (35-mm-)filmujoj. Plej kutime estas plastaj skatoloj ĉ. A5-grandaj. En la kaŝujoj troviĝas minimume loglibro (notkajreto), en kiun la trovinto notu sian nomon kaj la daton (kaj laŭvole alion). La pli grandaj ujoj entenas etajn objektojn por interŝanĝo. Regulo: Se oni volas ion elpreni, oni enmetu ion samvaloran. La aĵoj havas kutime nur malgrandan valoron de kelkaj centimoj aŭ frankoj, ekz. ludaĵoj, ŝlosilaringoj...

Kelkaj objektoj vojaĝas tra la tuta mondo, inter alie specialaj spureblaj monerecaj medaloj. Tiuj t.n. «geomoneroj» estas sekveblaj interrete, do la posedantoj ĉiam scias, kie ili troviĝas kaj kian distancon ili jam migris.

Do ni faru ekzemplan sercadon:

1e. Mi iras al la retejo geocaching.com kaj serĉas laŭ diversaj kriterioj ejon, kie troviĝas kaŝujo (ekz. en regiono, en kiu mi ferios). Mi vidas tie la ĝeneralan malfacilecon (inter 1 kaj 5) kaj la terenajn malfacilecon, mi ekscias pri la grandeco de la ujo, kiam ĝi instaligis, kiu estas la posedanto de ĝi ktp. Krome videblas, kiom da vizitintoj jam trovis la objekton, kia speco ĝi estas (ekzistas t.n. enigmaj kaŝujoj, kie vi devas unue cerbumi solvante enigmon iuspecan por eltrovi la koordinatojn) – kaj plej grave: la koordinatojn, ekz. N 46° 50.422' E 007° 29.193' (gradoj, minutoj kaj sekundoj en milonaj minutoj). Krome troviĝas ofte infoj pri la ejo, ekz. historiaj faktoj, bildoj ktp. Kutime la unuopajn kaŝujojn ne nur havas nomon, sed temon, ekz. pri la koncerna loko/urbo/tiea historia okazaĵo.

2e. Mi endonas, aŭ mane aŭ komputile, la koordinatojn en la birilon (GPS-ricevilon).

3e. Mi ekiras al la koncerna loko, depende de la distanco aŭte, trajne, piede, bicikle, ajne. La birilo montras ne nur la direkton al la celo per sago, sed ankaŭ multajn aliajn informojn (ekz. oni povas legi la aktualan rapidecon de la trajno, en kiu oni sidas, aŭ de si mem promenanta). Aŭ kiom da kilometroj mi jam iris (ekde certa punkto), kie nomiĝas la riveroj, kiujn mi super- aŭ preteriras, ktp. ktp.

4e. Mi alproksimiĝas la la ejo, kie troviĝas la geokaŝujo. Mi atente observas la sagon sur la ekraneto, kiu gvidas min al la celo. La birilo diras



Finfine trovita inter
arbaj branĉoj:
geokaŝujo kun
interŝanĝobjektoj
kaj loglibreto.

La du plej oftaj
simboloj (logotipoj)
de geokaŝado.



kiom for mi ankoraŭ estas kaj je kiu akurateco: ekz. 34 m (plus minus 15 metroj). La lastaj 10 metroj estas ĉiam la plej malfacilaj, ĉar la ekzakteco de la birilo varias, plej ofte pro malbona ricevo de la satelita signalo. Nun mi devas ekserĉi: ofte la kaŝitaj ujoj troviĝas en truo de arba radiko, aŭ malantaŭ loza ŝtono en muro, aŭ ili estas magnete fiksitaj ujo sub iu metala objekto (kiel ponto). Kelkfoje mi devas nur serĉeti, sed fojfoje serĉegadi duonan horon aŭ pli. Iufoje oni ne trovas la objekton, ĉar ĝi estas (intence) kamuflita tiom bonege.

5e. Mi trovis ĝin! Mi malfermas la ujon kaj notas mian ludantnomon en la kajereton (t.n. loglibron), daton kaj ĉu mi trovas ĝin bone, ŝatas ĝin, interŝanĝis objektojn ktp. Ofte oni enskribas dankon al la posedanto. Kaj oni povas legi, kion skribis antaŭaj trovintoj. Post refermo, remeto kaj rekamuflado, la tasko estas (preskaŭ) plenumita.

Geokaŝado estas bona okazo konatiĝi kun geografia loko, al kiu oni neniam antaŭe iris aŭ neniam irintus. Bone eblas kombini iun migradon kun serĉado de geokaŝujo, ĉar geokaŝujoj troviĝas preskaŭ en ĉiu regiono.

6e. Ree hejme mi reiras al la geokaŝa retejo kaj ankaŭ tie enskribas mian «trovon» (aŭ «netrovon») ĉe la koncerna paĝo de la kaŝaĵpriskribo. Per tia mesaĝo la kaŝaĵkreinto restas informata pri la aktiveco kaj stato de la ujo. Kaj mi ricevas poenton – ĉiu trovita aŭ kaŝita kaŝujo rezultas en unu poento en la persona statistiko. Iuj geokaŝludistoj (jes ja: -istoj) jam kolektis plurmil poentojn, t.e. ili trovis milojn da kaŝujoj.

Retejoj: geocaching.com (angle), swissgeocache.ch (france/germane).

*bir/o: ekzakta determino de la pozicio de (geografia) punkto. •

Kiel trovi ion en la informadika CDELI-katalogo ?

La informadika CDELI-katalogo estas parto de la katalogo « Neuchâtel et Jura », kiu mem estas parto de la pli granda katalogo RERO (réseau romand = romanda reto).

Nu, por konsulti ĝin unue iru al RERO (skribita majuskle aŭ minuskle) : www.rero.ch , due alklaku la prezent-ekranon (bluan), trie en « Catalogues », alklaku « Neuchâtel et Jura », kvare je la komenco eble limigu vin je simpla serĉo (recherche simple), skribante en la kadro kelkajn simplajn vortojn (aŭ nur unu vorton, se ĝi ne estas tre ofta). Atentu ! ne eblas skribi nur komencon de vorto, necesas skribi la vorton entute.

Se ni tajpas en la kadro la nuran vorton **cdeli**, tiam ni ricevas ĉiujn CDELI-noticojn ĝis nun katalogitajn, t.e. nun pli ol 4.000.

Sed ni prenu precizan ekzemplon : Ni imagu, ke ni interesiĝas pri la **paroladoj de Zamenhof**. En la kadro

ni skribu la vortojn : **zamenhof paroladoj** (ne gravas la ordo de la vortoj, nek la majuskloj). Ni ricevas 5 respondojn. Ni supozu, ke ni interesiĝas pli precize pri la verko *Historio de esperanto kun la paroladoj...* (Dresden, 1923). Tiam ni alklakas « cotes et exemplaires » kaj ricevas sciigojn pri 3 ekzempleroj, du estas ne prunteblaj (sed konsulteblaj surloke) : Li PB 14 kaj Li PB 14 b, unu estas pruntebla : ESP-P / Br 95.

Ne forgesu, ke la informadika katalogo entenas nur parton (kaj eĉ parteton) de la CDELI-kolektoj. La resto estas slipare konsultebla surloke.

La bibliotekistino de CDELI, Martine Schneller, estas rete kontakt-ebla por doni, okaze de neceso, pliajn informojn koncerne al la konsulto de la katalogo RERO.

Jen ŝia retadreso :

martine.schneller@ne.ch.

Petu senpagan ekzempleron de

Internaciisto

la organo de Komunista Esperanto-Kolektivo.

Interesa tutmonda enhavo - Konferenco ĉijara en Ĉeĥio : septembro 12-16-ajn.

Adreso: Internaciisto Font nova 32, ES 08202 Sabadell (Hispanio).

Feliĉu, eblas !

Kiu ankoraŭ ne ricevis tiun senpagan broŝuron, tiu petu ĝin ĉe Eldonejo Prosveta, CH-1808 Les Monts-de-Corsier, Svislando. Aŭtoro : O. M. Aïvanhov.

Esperantigo de Claude Piron.

Por detalaj klarigoj vidu http://www.prosveta.ch/izvor91_eo.html



Svisa kalendaro

Junie

22-24 : Lausanne: LES : Semajnfino super Montreux-Blonay.
28 : Basel : ESB : Grün.

Julie

4 : Wil : EKW : Ekskurso.
7 : Genève : EGR : Pikniko Bois de la Batie.
11 : Luzern : LES : Konversacia rondo.
12 : Basel : ESB : Krad-rostado ĉe H.- P. Senn.
15 : Redakta datlimo de *SES informas*.

Aŭguste

4-8 : Jokohamo : Universala Kongreso.
10 : Luzern : LES : Ekskurso vespero.
12 : Wil: EKW: Tuttaga ekskurso.

Septembre

1 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Konferenco-tago : Reinhard Haupenthal prelegos pri la vivo, verkaro kaj agado de Johann Martin Schleyer.
3 : Lausanne : LES : Kunveno.
5 : Wil : EKW : Kunveno.
12 : Luzern : LES : Konversacia rondo.
15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
22 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Oktobre

6 : Chaux-de-Fonds : CDELI Kultura seminario.
10 : Luzern : LES : Kunveno.
20 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Novembre

3 : Chaux-de-Fonds : CDELI Kultura seminario.
7 : Wil : EKW : Kunveno.
14 : Luzern : LES : Konversacia rondo.
17 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Decembre

1 : Chaux-de-Fonds : CDELI Kultura seminario.
5 : Wil : EKW : Fondua vespero.
12 : Luzern : LES : Kunveno.
15 : Redakta datlimo de *SES informas*.

2008 Januare

9 : Luzern : Konversacia rondo.
19 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Februare

2 : Chaux-de-Fonds : CDELI Kultura seminario.
16 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Marte

15 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

4 senpagaj libroj por bibliotekoj de esperanto-societoj.

Se via esperanto-societo ne posedas la sekvajn librojn, petu la mankantajn titolojn ĉe Eldonejo Prosveta, CH-1808 Les Monts-de-Corsier, Svislando, kaj vi ricevos ilin senpage.

Titoloj de la 4 libroj

Oraj reguloj por la vivo ĉiutaga - La jago de nutrado - Espero por la mondo : spirita galvanoplastiko - Sub la regno de la kolombo : paco regu.

Temas pri plibonigo de nia vivo dum rilatoj, nutrado, ktp. Aŭtoro : O. M. Aïvanhov.
Esperantigo de Claude Piron. Por detalaj klarigoj vidu :